# ĈINA DRAKO

## LA DRAKO ESTAS TOTEMO KAJ SIMBOLO DE LA ĈINA NACIECO

## ĈIJARE ESTAS BLUDRAKA JARO LAŬ LA ORIENTAZIA KALENDARO



Omaĝe al 151a Dimanĉa Kunveno de IKEF
Ĉielismo WANG Tianyi
La 11a de Februaro 2024

# Kio estas la ĉina drako?

Fakte en la mondo ne ekzistas tia besto Drako. Oni priskribas ĝian aspekton konsistan el partoj de diversaj bestoj, tamen ĝia kapo estas de krokodilo, kaj ĝia korpo estas de serpento. Pro tio oni nomas la krokodilon Drakego, la serpenton Draketo. Ili ambaŭ vivas en la rivero aŭ lago aŭ maro. La drako estas reĝo de la akva mondo konsista de la rivero, lago kaj maro, kaj ĝi kapablas flugi al la ĉielo, manipulante la tondron kaj pluvon, diference ke la krokodilo kaj serpento ne povas flugi al la ĉielo. Pro tio la krokodilo kaj serpento estas nur drakaj parencoj kiel aliaj bestoj en la mondo, sed plej ĉefaj partoj la kapo kaj korpo de la drako. Ĝis nun la ĉina popolo nomas sin la drakido, kaj la imperiestro titoligis sin filo de la drako.






# Kial la drako estas ĉina totemo?

La ĉina nacieco naskiĝis antaŭ 5000 jaroj, kiam la centra Ĉinio estis tropika regiono, kie tiam vivas tropikaj bestoj kiel la klokodilo(鳄鱼), serpentego(蟒蛇), testudo(乌龟), elefanto(大象), rinocero(犀牛), simio(猿猴), ŝarko, pavo(孔雀) k.a.











Ekde antaŭ 3000 jaroj la klimato iom post iom malvarmiĝis, tiuj bestoj translokiĝis al Sudorientazio. Ĝis antaŭ 2500 jaroj en la centra Ĉinio jam ne vivis tiuj trapikaj bestoj,kompreneble lokaj homgrupoj ankaŭ tempe post tempe al la Sudo

Tamen la varmoklimata pasinteco jam fandis la ĉinan naciecon je la lingveco (tona kaj solsilaba lingvo), skribado sur la testudo kaj bambuo, manĝkutimon (vaporigita kaj stufita manĝaĵoj kontraŭ tropika bakterio), nacieca totemo (drako el serpentego/boao kaj fenikso el la pavo kaj birdego) ktp.

1, La ĉina komuna lingvo estas mandareno, kiu lingvistike estas tropika lingvo kun tono kaj solsilabo kiel lingvoj en tropikaj regionoj, malgraŭ ke la centra Ĉinio jam ne estas tropika region kun la serpentego, elefanto kaj pavo.





2, La ĉina manĝaĵo estas vaporigita aŭ stufita trinku akvon boligita cele kontraŭ bakterio, la teakvo pli efikas ol boligita akvo.












# Kie naskiĝis la ĉina nacieco kun la drako?





Antaŭ 5000 jaroj estis pli ol dekmil triboj en Ĉinio. Laŭ riveroj migrinte Ili miksiĝis en la centra Ĉinio ĝuste en loko,kie renkontiĝas kelke da grandaj riveroj antaŭ Hua monto. Diversaj migrintoj okazigis rasomiksiĝon kaj fandis pli energian homgrupon Tiam en la diverserivera renkontiĝejo ekzistis granda lago kun krokodiloj, serpentoj, testudoj, kraboj, fiŝoj k.a. Kaj ĉe la lagego ankaŭ estas plantoriĉa delto, kaj longa salejo kaj montoj kun riĉaj oroj kaj kuproj. Tia kondiĉo estas unika tra la tuta Ĉinio.


# Unika medio kaj kondiĉo faris la ĉinan drakon

La diversaj riveroj donis multajn migrintojn kiel homan laborforton, farinte lagegon kaj fekundan delton. La lagego donis al la homgrupo facilan trafikon kaj sufiĉan manĝaĵon, kaj la fekunda delto donis plantoplenan tergrundon. Ankaŭ pro La longa salejo(financa fonto) kaj  kupra minejo(milita materialo) ĉe la lagego, la tiea homgrupo kun akvaj totemoj fariĝis pli civilizacia ol aliaj ekz. homgrupoj kun totemoj kiel elefantaj kaj pavaj oriente for de la lagego, k kun totemoj kiel bovaj kaj ŝafaj okcidente sur la vasta altebenaĵo. Rezulte la drako naskita en la lagego antaŭ Hua Monto fariĝis plej ĉefa totemo el diversaj bestoj kaj plantaĵoj tra Ĉinio.









# Draka kulturo donis la ĉinan ĉefnaciecon






1,Agrikulturisto(农民) en la ĉina lingvo egalas draka popolo(龙民). Tio signifas ke la ĉina agrikulturo originis en la regiono de la homgrupo kun la draka totemo.
2, La ĉina imperiestro nomis sin ĉiela filo de vera drako(真龙天子) . Per tio ili volas deklari sian tronon maluzurpa, kaj la ĉiela drako donis al ili sanktan regirajtecon.
3, Okaze de la ĉina Novjaro(Njan) oni ĉiam ludas la kolektivan dancon kun diversaj drakaĵoj cele por havi abundan pluvon kaj jarbonan rikolton.
4, Okaze de la dukvina festo(端午) ĉe la solstico oni kutime organizas diversajn konkursojn ekz. drakoŝipa matĉo alude por gajni la someran rikolton.

# Resuma frazo pri la ĉina drako

1,La ĉina kulto al la drako originis de la tropika tempo antaŭ pli ol 5000 jaroj en la regiono de la granda lago antaŭ Hua Monto, kien renkontiĝas kelkaj riveregoj.

2,La drako ne ekzistas en la mondo kiel la totemo konsista ĉefe el krokodilo kaj serpento, branĉe el diversaj bestoj vivintaj ĉirkaŭ la centra Ĉinio.

3,La drako estas reganto de la rivero, lago kaj pluvo. La riĉplena pluvo helpas la agrikulturadon. La ĉina kulto al la drako esprimas sian memorpasintecon de la tropika tempo antaŭ 5000 jaroj, ankaŭ esprimas sian bonpreĝon al riĉplena pluvo por havi la agrikulturan rikoltegon.

4,Historie lastajn kelkmil jarojn la ĉina klimato ĝenerale faliĝas iom post iom pli malvarma, kaj la vasta sekeco ofte minacas la vivon de la centra Ĉinio. Kaj de la centra Ĉinio tiamaj tropikaj bestoj ankaŭ antikvaj homgrupoj translokiĝis al la Sudorientazio. Tiuj tropikaj bestoj restigis nur sian nomon en la ĉina memoraĵo, kaj la antikvaj homgrupoj forlasis sian loĝnomon en la centra Ĉinio. La restintaj homoj jam miksiĝis kaj kunfandiĝis kiel la komuna ĉinaron, kaj translokintoj havas sian landon kiel Vjetnamio, Tajlando, Laosio, Mjanmario,kie ankaŭ vivas tropikaj bestoj.

# Koran dankon pro via aŭskultado! Bonŝancon al vi dum la jaro Blua drako kun abunda pluvo por la agrikulturo!

